# 100-jara jubileo

# de ESPERANTO
# en PARDUBICE



# 1909 - 2009

*Klubo de Esperantistoj de d-ro Schulhof*
*kaj*
*Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj*

Je multformeblaj mankoj kaj ĥaosoj, kiuj estiĝas el multeco, malfacilecoj kaj malperfekteco de la lingvoj, ne estas pli bona medikamento, ol krei novan lingvon, pli facilan, ke la homoj povu ĝin lerni sen perdo de tempo.

J. A. Komenio
Via lucis 1641

Kaj la lingvo ekzistas, ĝi estas simpla, facila, gracia, klara, parolema, kiu povas esprimi ĉion pere de kelkaj vortoj de vojaĝanto, kiu demandas pri ĝusta vojo, ĝis al tre delikata penso de profunda pensulo.

Carlo Bourlet 1904

Spite al hodiaŭaj neestimoj al aŭtoritatoj aŭ dubigo de esprimoj de aŭtoritoj, necesas konsenti kun instruisto de nacioj. La nova lingvo estis elkreita en la jaro 1887 de la pola kuracisto doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof.

Aperis espero, ke de la tempo „ĥaoso de lingvoj“ en Babilono, povas ĉiuj homoj denove interkompreniĝi. Sed el tiu ĉi sopiro estiĝis post la tempo stereotipo. Ĉefe en militaj jaroj kaj en periodo de totalito la homoj ĉesis kredi, ke la homoj estos denove bonaj, amikaj kaj ĉesis klopodi pri tio. Aperis, ke pli forta lingvo superas malpli fortan lingvon.

Alia situacio estas hodiaŭ. Ribelema junularo, kiu ne ŝatas akcepti ĉion, kio estas al ili trudigita, ĝi denove trovis la vojon al Esperanto, kiel rimedon al ligo de kontaktoj. Antaŭ ĉio pere de interreto. Ĉe malfermo de enciklopedio kaj slogano „esperanto“ ĝojiĝas koro de ĉiu esperantisto.


*Ludoviko Lazaro Zamenhof*

Pardubice en historio de Esperanta movado aperas jam en la jaro 1890, kiam ĉi tie František Vladimír Lorenc (profesoro vivinta poste en Brazilo, naskiĝinta en ĉeĥa vilaĝo Zbyslav kaj koninta 104 lingvojn) eldonis en Pardubice la unuan lernolibron de Esperanto por bohemoj.

La unua Esperanto-klubo en la ĉeĥaj landoj estis fondita en la jaro 1901 en Brno.

Ekde la jaro 1902 estis en Prago du kluboj. Ĉeĥa Societo Esperanta (Ĉeĥa Unio Esperantista), kiu kunligis nur klubojn kaj societojn kaj Bohemia Asocio Esperantista, kiu kunligis unuopulojn.

Esperanto-rondeto en Pardubice estis fondita laŭ malnovaj dokumentoj de MUD-ro Stanislav Schulhof en la jaro 1909, do ĝuste antaŭ cent jaroj. Tiu ĉi fakto estas dokumentita per atesto de postea sekretariino de la klubo s-ino Vamberová en la mesaĝo, prezentita en jarkunveno de la klubo en la jaro 1922. Alia pruvo

por tiu ĉi aserto estas reklamo de Unio de ĉeĥaj esperantistoj en la lernolibro de Eduard Kühnl el j. 1909, kie ankaŭ estas skribita Esperanto-rondeto Pardubice. Ankaŭ pri tio atestas tiatempaj bildkartoj senditaj al d-ro Schulhof. La mesaĝoj pri E-movado en Pardubice ĝis la jaro 1919 estis ĉerpitaj nur el ĵurnaloj; propraj skribaj dokumentoj de la rondeto ne ekzistas, ĉar la dometo de la familio Schulhof estis elbombardita dum la dua mondmilito.

Inter la unuaj pioniroj de E-movado en Pardubice estis krom d-ro Schulhof, inĝ. Ludvík Berger – oficisto de sukerfabriko en Dašice, Anna Petrová – edzino de profesoro, Jaroslav Hořeňovský — civila geometristo, studento de industria lernejo Pirkl, J. Košťál – instruisto, Jan Doležal, Antonie Vamberová, edz. Grossmanová, Ing. Daniel, V. Poppe – direktoro de alkoholfabriko, JUD-ro Josef Fousek, M. Kroutilová kaj pluraj. En la jaro 1913 estis jam 100 esperantistoj en Pardubice. E-rondeto de sia fondiĝo organizis ĉiujare kursojn de Esperanto en lernejoj, ankaŭ por plenkreskuloj; por studentoj kaj soldatoj la kursoj estis senpagaj.

E-rondetoj kaj unuopuloj estis ankaŭ en aliaj proksimaj lokoj, ekzemple en Holice, Heřmanův Městec, Hradec Králové, Chrudim, Jaroměř, Kukleny, Kutná Hora, Mikulovice, Nasavrky, Přelouč a Slatiňany. La E-rondeto, poste klubo ofte kontaktis kun ili kaj organizis renkontiĝojn de orientbohemiaj esperantistoj. Ekzemple en la jaro 1913 partoprenis la kongreson de Orientbohemiaj esperantistoj 120 personoj, en la j. 1920 50 personoj. Post la milito en la j.1947 okazis en Pardubice la Unua konferenco de orientbohemiaj esperantistoj.


*MUD-ro Stanislav Schulhof*

La plej signifa membro el la origina rondeto estis doktoro MUD-ro Stanislav Schulhof. Li naskiĝis en 1864 en Lipka ĉe Trhová Kamenice, kiel la dua filo de komercisto kun harretetoj. La familio havis dek infanojn, pli malfrue ĝi transloĝiĝis al Usono, nur Stanislav ĉi tie restis kun pli aĝa frato, kiu zorgis pri li kaj Stanislav sukcese abiturientiĝis ĉe kuracista fakultato. Stanislav dediĉis sin al denta specialigo kaj post kelkaj provaj lokoj li establis sin en Pardubice. Li estis tre talentita homo, patrioto kaj kuracisto, filantropo. Krom Esperanto li scipovis francan kaj ĉinan, anglan kaj germanan lingvojn kaj dum la milito li komencis lerni turke.
Li estis aganta ankaŭ kiel ĵurnalisto, teatra artisto, redaktoro, verkisto kaj poeto.

Li enskribiĝis en la historion de monda Esperanto-literaturo kiel unua lirika poeto per siaj kolektoj „Per espero al despero“, eldonita en la j. 1910, „Kion la vivo alportis“ el la j. 1911 kaj „Aŭtunaj floroj“ el la j. 1912 kaj tradukis en Esperanton versojn de niaj signifaj poetoj, kiuj estis eldonitaj en la jaro 1920 en la poemkolekto „Bohemaj grenatoj“. En la jaro 1922 estis kantita ĥore lia muzikigita poemo „Kia stranga voĉo“, tio okazis ĉe la 14-a Mondkongreso de Esperanto en Helsinko. Vico da liaj verkoj ne konserviĝis, ekzemple lia teatraĵo „Doto“.
Doktoro Schulhof estis delegito de UEA por Ĉeĥio. Li mortis en la jaro 1919 kaj lia tombo troviĝas en la juda tombejo de Pardubice apud sia la plej fidela amiko MUD-ro Vohryzek.
La urbo Pardubice konservis memoron je doktoro Schulhof per stratnomo kaj esperantistoj en la jaro 1921 titolis sian E-klubon per lia nomo.

La 13-a UEA kongreso de Esperanto en la jaro 1921 en Prago vekis E-movadon ankaŭ en Pardubice. En tiu ĉi jaro akceptis la klubo statuton, eldonitan fare de la Ĉeĥa E-Asocio en Prago, kiu estis aprobita de Landa politika administraro kaj akceptis novan nomon Esperanto-klubo de doktoro Schulhof en Pardubice. En la sama jaro estis eldonita la unua ĉeĥa kaj E-broŝuro pri Pardubice kaj Monto de Kunětice. Ĝin dokumentas aktoj el la 2-a jarkunveno de la E-klubo pri akcepto de statuto de la klubo kaj la nomoj de komitat-membroj.



Sur tiu ĉi foto el la jaro 1924 ĉe la vizito de poŝtdirektoro s-ro Guerra el Meksikio, ni povas nomi kelkajn membrojn de la komitato:
J. Lavička, Ega Kratochvílová (revizorino), Horníková, J.Doležal (vicprezidanto), M. Kroutilová (sekretariino), Zdeňka Schulhofová, R. Bloch, Vondrová (revizorino), R. Veverková (bibliotekistino), E.Guerra, xx, Spilková

En la klubo de Pardubice ofte haltis famaj eksterlandaj esperantistoj. Ekzemple en la restoracio „U bílého koníčka“ en la jaro 1925 okazis prelego de la fama rumana pedagogo Andreo Cseh el Sibiu. Li havis ĉeĥajn antaŭulojn – lia avo naskiĝis en Bohdaneč. Andreo Cseh estis aŭtoro de rekta instrumetodo de Esperanto, li instruis sen lernolibroj kaj sen uzo de la nacia lingvo. Helpe de tiu ĉi metodo li instruis militkaptitojn en Rusio dum la unua mondmilito kaj poste.

Grandan aktivecon atingis la klubo ankaŭ ĉe la Ŝtata ekspozicio de gimnastiko kaj sporto en la jaro 1931 en Pardubice. Ĝi kunlaboris kun ekspozicia komitato kaj organizis dum la ekspozicio dutagajn E-programojn, kiujn partoprenis 150 personoj inkluzive de esperantistoj el Germanio, Nederlando, Hispanio kaj Litovio.

Dum la dua mondmilito la klubo kaj ĝia agado estis malpermesitaj, ĉar la nazioj volis entrudi germanan lingvon kiel mondlingvon kaj multaj esperantistoj suferis kaj mortis en koncentrejoj pro alia opinio.

Sed tuj post la milito la klubo estis renovigita. Ĝi kunlaboris kun la radiostacio Pardubice, elsendis kurson de Esperanto kaj poste ĉiun ĵaŭdon E-kvaronhoreton.

En la jaro 1947 Internacia ligo por Esperanto akceptis la proponon kaj deklaron de la klubo, ke Esperanto estu uzata kaj propagata en poŝta kaj telegrafa rilatoj kaj en la trafiko kiel internacia lingvo.

En la jaro 1951 estis la klubo vicigita en la entreprenan klubon ROH ČSD – trafik-stacio Pardubice, poste al pluaj diversaj entreprenoj kaj de la jaro 1970 la agado koncentriĝis en Kulturan domon Dukla Pardubice.

Klubo en Pardubice ligis ĝemeliĝajn rilatojn kun esperantistoj el Berlino-Lichtenberg, estis organizitaj multaj reciprokaj vizitoj. En Pardubice okazis E-dancbaloj, sociaj Nikolaaj, okaze de Schulhof- kaj Zamenhof-vesperoj kun riĉa kultura programo, komunaj ekskursoj kaj E-Silvestroj.

En Pardubice estis aranĝitaj tutŝtataj seminarioj de funkciuloj, preparoj por somera E-tendaro (SET), asociaj E-ekzamenoj kaj en la j. 1982 ankaŭ la 4-a kongreso de ĈEA. La klubo havis 59 membrojn en la j. 1977.




*Esperantistoj en Pardubice en la j. 1954: en malantaŭa vico: M. Synek, J. Štechr, xx, xx, xx, O. Hrubeš, xx, xx, J. Nálevka, xx, meza vico: J. Hašková, , xx, xx, J. Janoš kun la edzino, xx, sidantaj: J. Rybáčková, V. Froňková, M. Kutílková, V. Hrubešová, E. Bittnerová, xx.*

En la jaroj 1975 – 1979 la plej maljuna ano de la klubo Jaroslav Pauk kompilis kluban historion ekde la jaro 1909 ĝis komenco de la j. 1979. Tiam estis malmulte da fotografiaj dokumentoj, sed admirinde multaj detalaj priskriboj de la kluba agado. Vi ne povas imagi, kia formika laboro estis tralegi manskribitajn protokolojn el laborkajeroj kaj kompili kronikon por 70 jaroj. Plua agado de la klubo poste estis jam regule registrita en kronikojn kaj pli multe kompletigita per fotografaĵoj.

En la j. 1979 festis la E-klubo 70 jarojn de sia fondiĝo. El iniciato de EK Dukla estis la solenaĵoj ligitaj kun la unua renkontiĝo de pacdefendantoj kaj tiel estis malfermita tradicio de internaciaj pacaj renkontiĝoj, kiuj realiĝis ok. Tiu ĉi renkontiĝo havis grandan sukceson eksterlande, pri kio atestas multaj artikoloj en E-ĵurnaloj kaj granda partopreno de eksterlandaj esperantistoj. Entute partoprenis 2750 personoj, el tio 426 eksterlandaj gastoj, el Aŭstrio, Belgio, Britio, Bulgario, Francio, Germanio (DDR kaj BRD), Hungario, Jugoslavio, Kanado, Nederlando, Pollando kaj tiama Sovetunio. Parto de ĉiu internacia E-renkontiĝo estis ankaŭ vizito de la ekzekutejo el la tempo de okupacio dum la dua mondmilito ĉe la tiel nomata „Zámeček“ (Kasteleto) kaj ekskurso al la vilaĝo Ležáky, kiu estis forbruligita de nazioj. Tie estis metitaj bukedoj omaĝe al la viktimoj. De iniciato de esperantistoj el Pardubice kaj Belgio estis en la jaro 1984 realigita la ŝanĝo de humoj el la Zámeček Pardubice kaj el Citadelo el belga Lieĝo. Tiun interŝanĝon partoprenis persone la belga konsulo s-ro Gowaerts.
Esperantistoj en tiu tempo ankaŭ kolektive partoprenadis rememorajn promenojn al Ležáky, okaze de tiuj tristaj datrevenoj.

Por ambaŭ pietaj lokoj, Ležáky kaj Zámeček, klubaj membroj kompilis E- versiojn de prelegoj pri tragika evento.
Inter la plej aktivajn esperantistojn de tiu ĉi tempo apartenis Milada Hemerková, Karel Franc, Ludmila kaj Miroslav Srb, Věra Froňková kaj pluaj.




En la jaro 1978 fondiĝis en la dua rando de la urbo Pardubice, en la baza lernejo Studánka, origine infana „Rondeto de internacia amikeco“, el kiu post ia tempo estiĝis ankaŭ rondeto de plenkreskuloj kaj ĝia patrono fariĝis Entreprena klubo Tesla Pardubice.

La ĉefa celo de la E-klubo estis Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj. Ankaŭ estis realigitaj en vestiblo de la entreprena klubo Tesla kelkaj ekspozicioj pri kluba agado de E-rondeto.
En la jaro 1982 translokiĝis tiu ĉi rondeto en alian bazan lernejon en kvartalo Polabiny Pardubice.

Kolektivo de E-infanoj ĉe ekstra subteno de gepatroj ligis amikajn rilatojn kun infanoj el germana urbo Meissen kaj el hungara urbo Revfülop ĉe lago Balaton.
Okazis oftaj reciprokaj vizitoj, ankaŭ al Altaj Tatroj en Slovakio kaj al pluaj lokoj, kie infanaj grupoj ĉiam sin prezentis.

Klubanoj havas ankaŭ belajn rememorojn je tiel nomataj „letervesperoj“ el la jaroj 1982 ĝis 1991. Pere de E-gazetoj ili petis esperantistojn el la tuta mondo, ke skribu pri si kaj pri E-agado kaj ke ili ricevos el Pardubice respondon kun bela bildkarto. Venis 139 leteroj el 26 landoj. Dum la kunvenetoj estis ĉiuj leteroj tralegitaj kaj membroj aŭ infanoj laŭ sia intereso respondis. Ofte la internacia korespond-amikeco daŭris multajn jarojn kaj kelkaj ĝis nun.



En la vestiblo de la Entreprena klubo Tesla en la strato Hronovická efektiviĝis kelkaj ekspozicioj pri la kluba agado.

De la jaro 1986 ĉiu-jare kulminis la agado per la renkontiĝo, tiel nomata „Esperanto-tago“, je kiu estis ĉiam invitata ankaŭ neesperantista publiko.

La klubo havas ankaŭ meriton en kunlaboro ĉe reinstalo kaj devualo de memortabulo de L. L. Zamenhof en la urbo Františkovy Lázně. La originan tabulon rompis ia vandalo.



Starigo de amikecaj kontaktoj kun esperantistoj en germana urbo Weiden en la jaro 1987 malfermis la vojon al reciprokaj vizitoj (tiutempe estis bezonataj vizoj). La grupo de infanoj, kiuj studis Esperanton, unuan fojon vojaĝis malantaŭ landlimoj. Ĉiuj povis kontroli siajn konojn en la medio, kie ili ne povis utiligi sian gepatran lingvon.

En la jaro1991 Kultura domo Dubina transprenis aŭspicion super la E-rondeto kaj estis akceptita malnov-nova nomo“ Klubo de esperantistoj de doktoro Schulhof“.

En la jaro 1993 Klubo de d-ro Schulhof organizis dektagan internacian ICEM renkontiĝon (= pedagogia seminario sub aŭspicio de la Internacia organizo por moderna eduko pere de Freinet-metodo en la lingvo Esperanto). Klubo prizorgis ankaŭ la tutan akompanan kulturan kaj ekskursan programojn.



Partoprenis ĝin 52 eksterlandaj gastoj el naŭ landoj. La gastoj estis tre kontentaj pro bona organizado, pro realigo de kelkaj ekskursoj tra Orienta Bohemio kaj pro prezentado de la folklora ensemblo Karmazín.

Sekvontan jaron francaj kaj nederlandaj partoprenantoj invitis kelkajn klubanojn en siajn landojn por trisemajna migra vizito.

De la jaro 1995 la klubo ligis bonan kunlaboron kun Asocio de Esperantistoj Handikapuloj (AEH). Ambaŭ organizoj – klubo kaj asocio ĉiujare plu organizadis renkontiĝojn „Esperanto-tago“ (kiuj ĝis la jaro 2009 atingis nombron 18), kunlaboris ĉe organizo de busvojaĝoj, ekzemple en Varsovion al ekspozicio „De Komenio al Zamenhof“, kie la partoprenantoj vizitis la tombon de kreinto de Esperanto.

Ambaŭ organizoj kunlaboris en eta eldona agado, komune preparis kaj eldonis ĉeĥajn poemojn de d-ro Schulhof, kiuj ĝis nun ne estis publikigitaj, broŝuron „La vivo kaj verko de d-ro Schulhof“ en esperanta kaj ĉeĥa lingvoj, tradukojn de poemkolektoj de František Hrubín „Horloĝo de Mánes“ kaj de Karel Toman „Monatoj“, „Kolekton de ludoj en Esperanto“, bildvortarojn en kajera eldono ktp.

La klubanoj poste transprenis la ĉeffunkciojn de AEH, ĉefe Jarmila Rýznarová akceptis al la funkcio de la prezidantino de E-Klubo ankaŭ funkcion de prezidantino de la asocio kaj redigadon de periodaĵoj post la morto de Josef Vaněček, la fondinto de AEH.

Kaj tiel ĉiuj laboroj de kompilado, kopiado, redigado kaj ekspedado de la regule monate eldonata gazeto Informilo inkluzive kun la tuta oficejo de la asocio venis al Pardubice. La kunlaboro de la klubo kaj asocio estas tiel proksima, preskaŭ kunligita, ke ofte ni devas klarigi al ni, ĉu ian renkontiĝon aranĝas la klubo aŭ asocio. La klubo kunlaboras ankaŭ kun kelkaj aliaj societoj en Pardubice.



*Ĉi tie nur eta grupo, tamen la membroj el urboj Česká Lípa, Zruč, Mníšek, Prago kaj Lysá n.L..*

Unufoje en la monato estas aranĝataj sabataj perfektigaj antaŭtagmezoj, tiaj lingvaj seminarioj, ĉefe en praga klubejo de pensiuloj; iam ankaŭ en Pardubice, kion ŝatas la partoprenantoj, kiam ili povas ĉe bela vetero lerni kaj sidi en la ĝardeno.

La grupo de klubanoj partoprenis ankaŭ 81-an UEA kongreson de esperantistoj en Prago – en la jaro 1996, kiun ĉeestis preskaŭ 3000 esperantistoj el la tuta mondo, kelkaj helpis kiel deĵorantoj.




En la jaro 1998 estis organizita dektaga busvojaĝo al UK en francan urbon Montpeliero por esperantistoj el la tuta nia lando.




*Kongresejo en Montpeliero*

Por ke la ekskurso estu por niaj esperantistoj kiel eble la plej malmultekosta, ni organizis ĉion propraforte krom busvojaĝo, tranoktado kaj kongresaj kunvenoj.

Baza nombro de esperantistoj bedaŭrinde ne plu estas tiom granda, kiel en pasinteco. Tamen la klubo ne rezignas en organizado de la E-kursoj por interesuloj de Pardubice, ĉiulunde okazas en la klubejo konversaciaj kunvenetoj. Dum ili ni plibonigas tradukojn de diversaj memorindaĵoj aŭ de interesaĵoj ne nur de nia regiono. Ekzemple ni estis petitaj pri traduko de gvidlibreto pri monaĥejo „Svatý Jan pod Skalou" (Sankta Johano sub Roko), /, fare de Pavel Nechvíle./www.svatýjan.cz/index esper.htm.
Dufoje jare estas dissenditaj informoj por la kluba membraro, kiujn ricevadas ankaŭ jam neaktivaj eksmembroj kaj E-favorantoj.

Komence de la jaro 2000 kuniĝis la E-klubo de d-ro Schulhof kun E.-rondeto de pacdefendantoj ĉe la KD Dukla en Pardubice. Pro sanproblemoj de la ĉefaj funkciuloj de EK Dukla, ili jam ne povis plu dediĉi sin al E-agado. E-materialo kun granda biblioteko el la ŝrankoj de Dukla devis esti translokigitaj en la domon de Jarmila Rýznarová. Diversaj dokumentoj, gazetoj ktp. estis forveturigitaj en la E-muzeon de Česká Třebová.



Ankaŭ en januaro 2000 alveturis en la klubon nekutima vizito de franca familio, kiu dum ses jaroj volis ekkoni Eŭropon alimaniere ol la ceteraj. Rakontado pri migrado de la familio tra ok landoj de norda Eŭropo, akompanita per projekciado de multaj diapozitivoj tre surprizis la ĉeestantojn.

La posedanto de ĝardenista entrepreno kaj best-kuracistino kun malgranda filineto Lola vendis la loĝejon kaj aŭtomobilon; ili forlasis malnovan domon kaj gepatrojn, aĉetis ĉevaleton kaj domveturilon. Ili decidis traveturi la tutan Eŭropon. Kiam ili alveturis al ni, ilia ĉarma filineto estis trijara. La vintran periodon de tiu jaro la vojaĝantoj travivis en nia respubliko kaj ilia eta Lola dum unu monato en antaŭlernejo kun ni bone interkompreniĝis ĉeĥe kaj Esperante.



La jaro 2000 estis plena de pluaj agrablaj travivaĵoj. Eble plej multajn havis tri gemembroj de la E-klubo, kiuj aŭtomobile dum 25 tagoj ĉirkaŭveturis la francan marbordon de Normandio kaj Bretanio kaj ĉirkaŭ Loaro-kasteloj ili revenis. Ili tranoktadis ĉe 16 familioj de esperantistoj kaj travojaĝis 5 mil kilometrojn. Ili persone spertis, kiel eminenta estas la Pasporta servo (gastiganta reto senpaga nur por esperantistoj). En ĉiujare eldonata jarlibro estas skribitaj proksimume 1320 adresoj el 92 landoj.

Nova jarcento kaj jarmilo komenciĝis per la jaro 2001. Ĉu Esperanto pli bone fartos? Tiu ĉi jaro estis proklamita kiel Jaro de lingvoj. Sed komenco de la jaro ne estis favora. Multjara E-funkciulino kaj organizantino de konataj internaciaj pacrenkontiĝoj Milada Hemerková mortis en siaj neĝisvivintaj 76 jaroj.

En aŭgusto 2001 E-klubo kunlabore kun AEH organizis busekskurson al 86-a UEA kongreso al kroata Zagrebo. Kunveturis kun ni ankaŭ interesuloj de kelkaj aliaj kluboj el la tuta respubliko.



*Sur la foto parto de niaj kongresanoj en Zagrebo*

En novembro 2001 nia organizaĵo (E-klubo kun AEH) komencis uzadi interreton, kio ebligis pli viglajn kontaktojn kun pluaj E-kluboj kaj kun unuopaj esperantistoj. Ĝi alportis grandan alfluon de korespondaĵo kaj multajn novajn mesaĝojn kaj informojn. Kaj ĉar ĉiu komenco estas malfacila – aparte por nejuna persono – grandan helpon en tiu ĉi moderna tekniko havis la prezidantino de AEH en sia nepo Jirka.




La kvara internacia kongreso de AEH en la pensiono Sola fide – Janské Lázně en Gigantmontaro, estiĝis signifa evento de la jaro 2002. Ni estis tre kontentaj kun bona ĉeesto de niaj membroj. Tutan semajnon utiligis 65 esperantistoj el 26 lokoj de Ĉeĥio kaj el pluaj ses landoj belsonan internacian lingvon ne nur ĉe prelegoj, kunvenoj, sed ankaŭ dum ekskursoj kaj amuzaj vesperoj. Kantoj en la ĉeĥa kaj esperanta lingvoj sonis tra la tuta pensiono.
Aŭtune ni preparis ekspozicion pri Esperanto kaj pri nia agado en la Regiona biblioteko, ĝi estis malfermita la tutan novembron kaj printempe de la plua jaro ĝi migris al vestiblo de Urba teatro en Žďár n/S. por du monatoj.

La jaro 2003 estis proklamita kiel Eŭropa jaro de handikapuloj. Nia organizaĵo estis alvokita de la funkciulo de Brusela komunika-centro kaj UEA en Nederlando, ke ni komune kun ili kreu deklaron okaze de tiu ĉi evento de eŭropa signifo. La deklaron ni sukcese ellaboris kaj ni ĝin ankaŭ sendis en dek ĉeĥajn redakciojn de ĉeĥaj ĵurnaloj.

En tiu ĉi jaro ĉe la jarkunveno de E-klubo estis elektita nova prezidantino Mirka Kosnarová.

La 14-an Esperanto-tagon ni organizis post 3 jaroj, la 20-an de septembro 2003 en Kultura domo Dubina. Partoprenis ĝin 56 esperantistoj el 24 lokoj de nia respubliko. En la programo estis ankaŭ montrita kreado de interreta granda E-vortaro, kiun jam naŭ jarojn prilaboras la vicprezidanto de E-klubo kaj de AEH Josefo Hron. La vortaro jam enhavas 210 000 vortojn kaj oni eblas ĝin trovi en interreta adreso (www.esperanto.wz.cz).

Por granda propagando de nia organizaĵo ne estas mono. Do ni devas klopodi almenaŭ per etaj eventoj veki ĉe la publiko intereson pri „ia" internacia lingvo Esperanto. Dum 15 jaroj ni havis eblon uzadi grandan montrofenestron ĉe la firmao Filatelie en centro de la urbo en komerca pasejo.
Ĉar estis preparata rekonstruo de la tuta pasejo, ni longe ne povis trovi alian taŭgan lokon kaj nur post duono de la jaro ni sukcesis trovi malmultekostan montrofenestron 2m x 1m en la kvartalo Na Skřivánku apud la viand-vendejo. Sed por kia tempo?

Por la jaro 2004 ni preparis Internacian renkontiĝon de AEH kaj XV-an E-tagon.
Ja, E-klubo en Pardubice en tiu tempo ekzistis jam 95 jarojn kaj ni ankaŭ rememoris 140-an datrevenon de fondinto de la klubo d-ron Stanislav Schulhof. La renkontiĝo okazis en areo de SOU+SŠ (konstrua faklernejo kaj metilernejo) en Rybitví ĉe la partopreno de 65 ĉeĥaj kaj 8 eksterlandaj esperantistoj. Salutvortojn prezentis ankaŭ vicurbestro de la urbo.
Okaze de tiu ĉi renkonto estis pretigita la dua disvastigita eldono de la broŝuro „La vivo kaj la verko de doktoro Schulhof" esperante kaj ĉeĥlingve. Jarmila Rýznarová kompilis kaj por la videofilmo preparis resumon de ĝisnunaj eventoj el E-vivo en Pardubice.




*Nia grupo antaŭ kongresejo*

En la jaro 2005 la oferema membro de la klubo inĝ. Hron denove organizis ekskurson al la 90-a UEA kongreso en litovan Vilnius.

La partoprenantoj ĝuis multajn travivaĵojn. Dum la vojaĝo ili vizitis kelkajn interesajn lokojn



*Monto de krucoj*



*akva kastelo Trakai*



*Statuo de David*

Pluan kongreson de UEA la 91-an en itala Florencio vizitis tri niaj membroj pere de busvojaĝo, kiun aranĝis E-klubanoj de sudbohemia urbo. Tamen ni aŭdis raportaĵon de Ludmila Srbová, ĝi poste estis publikigita en Informilo.

Proksime de Pardubice, al kiu oni diras mielkuka pro ĝia fama produktado, estiĝis muzeo de mielkukoj kun la nomo „Perníkové hejtmanství“ (Mielkuka hetmanejo). Al ekspozicia materialo apartenas ankaŭ la fabelo pri mielkuka dometo, eldonita en multaj lingvoj, sed ĝi mankis en Esperanto. Do, ni klopodis en du someraj feriomonatoj; praga membro J. Patera tradukis la fabelon, ilustraĵon faris Zd. Novotná el Česká Třebová, pri kovrilo, aranĝo ktp. zorgis membroj de EK Pardubice kaj de septembro 2006 inter aliaj lingvoj troviĝas ankaŭ la „Fabelo pri mielkuka dometo“ en Esperanto.

Ĉeokaze de la „Tago de eŭropaj lingvoj“ okazis relacio kun sekretario Pavel Nechvíle en Ĉeĥa radio en Pardubice.

En septembro 2006 estis komencita kunlaboro kun Radio-aktiva Urugvajo, kiu petis esperantistojn de la tuta mondo pri kontribuoj skribitaj aŭ rekte parolitaj en ilian radioelsendon. Ĝis tiu tempo niaj membroj hezitis pro neniaj spertoj, kiamaniere kun la radiostacio kontakti. Fine venkis scivolemo de J. Rýznarová, kiu ligis la kunlaboron. Proksimume ĉiun duan monaton ŝi tien sendis aŭ helpe de sia nepo surbendigis relacion. Do en ilia radioelsendo aperis informoj pri Pardubice, pri kutimoj kaj vivo de nia regiono kaj pri la Asocio de E-handikapuloj, kiu estas tia sola organizaĵo en Eŭropo. Okaze de la lasta kongreso de AEH en majo 2007 ni aŭdis salutvortojn por nia kongreso rekte el la radio de Urugvajo.

La ĉefa evento de la jaro 2007 estis la 5-a Internacia kongreso de la Asocio de E-handikapuloj (30. 5.– 4. 6. 2007) en Juniorcentro sur la bordo de akvovalbaraĵo Seč.





Kongresan traktadon buntigis la promenadoj en ĉirkaŭaĵon de la valbaraĵo, al la kastelo Žleby, akvovalbaraĵo Pařížov kaj Křižanovice, ni vizitis pietan lokon Ležáky kaj en la muzeo ni vidis ĉe la urbeto Nasavrky la ekspozicion „Kelta setlejo“. Informoj pri la kongreso aperis ankaŭ en la elsendo de la Ĉeĥa televido.

En la kongreso estis elektita nova komitato de la Asocio: Prezidanto Pavel Nechvíle, vicprezidantino Ludmila Srbová, sekretariino kaj redaktorino de Informilo Jarmila Rýznarová, financa mastrumanto Inĝ. Josef Hron. La membroj: Jindra Drahotová, Jana Křížková, Josef Filip, Mirka Kosnarová, Jiří Kosnar, Inĝ. Josef Krob, Zdena Novotná, Pavol Petrik. Kontrola grupo: Lenka Angelová, Dana Hricková, Adolf Veselý.



*Ĉarma medio de la akvovalbaraĵo Pařížov sur la rivero Doubrava*

En aprilo 2008 ni aranĝis jam XXVI-an lingvan seminarion en la vilaĝo Skokovy. La seminarioj okazas ĉiujare printempe kaj aŭtune, ili prezentas 13 jarojn de oferema laboro de organizantoj kaj lektoroj.



*Parto de ĉeestantoj en Skokovy 2008*

La membroj de AEH tre ŝatas la medion de malgranda pensiono Espero en Bohemia Paradizo kaj lian originan posedanton, membron de AEH MUDron Josefon Hradil. Bedaŭrinde li mortis aŭtune 2008.

Atentinda estas ankaŭ nia tutjara agado informa kaj kleriga. Jam 25 jarojn, en la unua triono de ĉiu monato estas kompilita kaj ekspedata monatgazeto Informilo kaj komence de ĉiu kvaronjaro kultur-amuza suplemento, kiu nomiĝas Antaŭen. Ili estas skribitaj nur en Esperanto kaj ricevadas ilin 170 esperantistoj en nia respubliko kaj 50 membroj en 19 fremdaj landoj.Tio prezentas milojn da propraj artikoloj, tradukoj kaj transprenitaj artikoloj el ĉeĥaj ĵurnaloj kaj internaciaj gazetoj. Ĉio necesas bone traduki, gramatike korekti, ankoraŭ sendi al pluaj okuloj por korekto. Kaj ĉion kopii, foliojn faldi, sur la kovertojn glui adresojn, ĉion enmeti en la kovertojn, surglui poŝtmarkojn, noti en la nomaron... Ĉio estas produktata en privata loĝejo en la strato Na Okrouhlíku, en tiel nomata redakcio de Informilo, ĉefe merite de J. Rýznarová, L. Srbová kaj J. Kosnar, kiu zorgas ankaŭ pri niaj TTT-paĝoj (www.volny.cz/aeh-ikeh).




Komenciĝis preparo de dignoplena solenaĵo :“100 jaroj de Esperanto en Pardubice“. Ĉu ni havas ion por festi? Ĉu ne estas Esperanto senĉese nur „Cindrulino“ inter ceteraj lingvoj? Ja, ni jam pli multajn jarojn ne instalas propagandajn afiŝojn pri kursoj de Esperanto por komencantoj aŭ progresantoj kiel en fruaj jaroj, ni ne multigas lerntekstojn, ni ne konvinkas tiujn

nekredantojn, ke Esperanto ankoraŭ vivas. Antaŭ ne tro multa tempo ni plendis, ke Esperanto maljuniĝas, ke la junularo ne interesiĝas pri ĝi, ke ili favore lernas ĉefe anglan lingvon.

Kia ŝanĝo venis? Kia estas kialo? Interreto! Esperanto estas hodiaŭ la lingvo plene disfluanta per aktiva tutmonda kompanio, kiu pli kaj pli uzas interreton kiel sian ĉefan komunik-rimedon. por amikeco kaj por komerco.

Ekzistas granda multego da esperantistoj en Eŭropo, sed ankaŭ en la landoj malproksimaj kiel Ĉinio, Brazilo, Rusio, Ameriko, Japanio, Irano kaj nove ankaŭ Afriko. Esperanto estas libere uzata de tiuj, kiuj sukcesas labori en interreto helpe de dekoj da programoj Wikipedia, Google, Libera folio, ICQ, IRC kaj PalTalk, Ipernity, Skype, ili havas pli ol centmilojn da vizitantoj monate kaj vizitantojn de interretaj paĝoj oni kalkulas je milionoj.

Kiel ni jam diris, la junularo en hodiaŭa tempo ne interesiĝas pri normalaj kursoj, hodiaŭ estas aliaj ebloj. Lernado helpe de interreto estas pli amuza ĉefe por junaj homoj, kiuj komencis labori kun komputiloj jam en bazaj lernejoj kaj ni pli aĝaj nur miras kaj admiras milojn da junaj uzantoj, kiuj lernas Esperanton sur interreto.

Kaj tiel post multaj jaroj de stagnado Esperanto revenas al pli rapida disvastiĝo. Ekzemple la programo Ĝangalo.com malfermis en interreto vojon al profesiaj servoj en la lingvo Esperanto. La portalo estas tage aktualigata kun koncizaj mesaĝoj el la tuta mondo, artikoloj, videofilmoj, blogoj, videoludoj, fotoblogoj, interkonatiĝaj anoncoj ktp., ĉio en Esperanto.




En majo 2008 E-handikapuloj signife kontribuis pri donaco de baza ŝtono por nova Nacia biblioteko, kvankam ĝi estos konstruita kie ajn. Aŭtore kunlaboris Zdeněk Myslivec kaj Viktor Dvořák.

Pluajn kontaktojn ni havas kun E-eldonejo Lorenz en Rio de Ĵaneiro en Brazilo, kun funkciulo de fame konata Ligo de Bona Volo en Brazilo kaj daŭras nia amikeco kun redaktoroj de Radio Aktiva en Urugvajo.

Lasttempe estis ligataj amikecaj rilatoj kun najbara pola Silezia E-Asocio, en julio 2008 ni partoprenis internacian renkontiĝon en Szczawno Zdroj.




*Nia vizito ĉe polaj esperantistoj*

La ĝisnuna agado estis tre riĉa kaj tiel ni pensas, ke tamen necesas rememori je komencoj de Esperanto en Pardubice antaŭ cent jaroj. El la tempo de fondiĝo de la klubo jam neniu vivas, sed ni alvokis posteajn membrojn de la klubo el Pardubice kaj ĉiujn uzantojn de internacia lingvo, ke ili per siaj travivaĵoj pliriĉigu nian renkontiĝon.

Por la komenco de la julio, konkrete de 3. - 6. 7. 2009 ni preparas tritagan Internacian renkontiĝon okaze de 100-jara jubileo de nia klubo kaj ni samtempe rememoros ankaŭ la 90-an morto-datrevenon de la fondinto de E-klubo en Pardubice, doktoron Stanislav Schulhof.

Ni vokas en nian centron ĉiujn interesulojn pri la internacia lingvo. Ni kredas, ke unuigo en Eŭropo kaj serĉado de pli profunda kunlaboro inter nacioj ankaŭ en cetera mondo kaj demokrateco de homa komunumo elkreos jam en proksima tempo kondiĉojn por granda disvolviĝo de demokrateco ankaŭ en lingva medio, ke eĉ ne malgrandaj nacioj devus timi pri tio, ĉu ilia lingvo kaj nacia kulturo ne sinkos en la lingvo de alia pli nombra, ekonomie aŭ armee forta nacio. Tiajn kondiĉojn povas krei nur evoluo de neutrala komuna lingvo por internacia komunikaĵo, evoluo de Esperanto.




Eldonis: Klubo de esperantistoj de d-ro Schulhof kaj Asocio de E-handikapuloj en Pardubice en novembro 2008.
La ĉeĥan broŝuron kompilis Pavel Nechvíle, Inĝ. Josef Hron, Jarmila Rýznarová.
Elĉeĥigis Jarmila Rýznarová en aprilo 2009.
Fotoj: arkivo de EK+AEH, elektronike aranĝis Jiří Kosnar

# E